



LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE LA MONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO

Redaktejo: S-ro E. Burgler, Amsterdam-W., Overtoom 435²

Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55

Giro de TEJO por Nederlando: 537168 Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

ĈU NENIU LEGAS LJV-n?

Dum la lastaj du jaroj diversaj estraranoj skribis diversmaniere pri la danĝera situacio, en kiu TEJO troviĝas. Escepte kelkajn ankaŭ jam cetere aktivajn membrojn, flanke de la anaro venas nenia helpopropo. Ĉu la TEJO-zanoj fariĝis tiom indifentaj por la propra organizo, por la ununura ĉeno, kies ĉeneroj ni ĉiuj estas, ke al ili ne gravas, kio ajn okazos? Jam antaŭ la kongreso de Wörgl mi aperigis admonon en LJV, poste prezidanto Tammo klarigis la situacion, Felix Kat skribis longan artikolon, prezidanto Roel petis vian kunlaboron, sed ŝajne LJV skribiĝas grandparte por blindaj analfabetoj. Mi scias, ke miaj vortoj estas akraj, sed refutu ilin. Ne gravas, kion ajn vi faras, sed faru ion por pligrandigo de TEJO, faru ion por via propra organizo, por via propra familia rondo. Mi estas danka al f-inoj Rees kaj Nixon, kaj ĉefe al S-ro Guy Tordoff, kiuj regule donas konsilojn kaj sendas artikolojn, mi dankas ankaŭ srinon v. Veenendaal pro ŝiaj rimarkoj, kaj krome la ĉehajn kaj polajn gesamideanojn, kiuj skribas. Sed kie

restas la kunlaboro de la ceteraj membroj? Mi scias, ke vi ĉiuj estas okupitaj, sed pripensu, ke ankaŭ la estraranoj laboras 17-18 horojn po tage (kelkfoje eĉ pli) por eltiri TEJO-n el tiu situacio, en kiun ĝi implikiĝis.

Post kelkaj monatoj okazos nia IJK. Laŭ mia opinio ĝis nun ankoraŭ neniam estis la programo tiom interesa, tiom altnivela, kiom ĉi tiun jaron. Do L.K.K. faras ĉion eblan, por via distro kaj en la intereso de TEJO. Ne pensu, ke kiu ajn L.K.K.-ano sin elektigas por propra honoro! Felice jam anoncis sin relative multaj personoj. Tamen ni kalkulas je pli granda nombro. Estas grave, ke vi la anataŭpagon sendu samtempe kun via aliĝilo. Aŭ ĉu vi deziras, ke la LKK pagu ĉion el sia propra poŝo? Kion vi ne deziras por vi mem, ne faru ankaŭ por alia.

Kie restas la listoj de la perantoj? Kie estas la abonkotizoj? El preskaŭ ĉiuj landoj oni povas sendi la monon per internacia poŝtmandato al Nederlando. Pripensu, ke la mono estas por la kuranta jaro kaj ke ni devas

Nederlando: Nederlandaj TEJO-anoj ne forgesu vin anonci por la pentekosta kunveno en Putten. Partoprenu la jarkunvenon. Informojn donas Ben van Moors, Eendrachts-park 19, Bussum. Ankaŭ eksterlandanoj estas bonvenaj. (Pri detaloj vidu nian antaŭan nron).

Anglujo: Bedaŭrinde ne veturos angla karavano al la kongreso. Anguloj, vizitontaj la IJK-n aliĝu al iu karavano.

Germanujo: Bedaŭrinde de diversaj flankoj venis plendoj, ke la lastjare elektita germana peranto malzorgas la aferojn kaj resendas la mensekondojn destinitajn por TEJO. Ni petas Toni Hopfenmüller tuj sciigi al ni, ĉu li pretas kolekti la kongreskotizojn kaj ilin sendi aŭ al la TE-

JO-kasistino, aŭ (eĉ prefere, se tio eblas) rekte al la OKK. La afero urĝas. Ni atentigas Toni, ke li deklaris pasintjare, ke li kiam ajn volonte inklinas helpi la peranton. Kiu gvidos la germanan karavanojn? Kiun vojon ili sekvos? Tuj sendu viajn sciigojn, por ke ni anoncu ilin en la JV.

Franco: Kiun vojon sekvos la franca karavano? Bonvolu informi nin, por ke ni publikigu tion en LJV.

Hispanujo: Kun ĝojo ni sciigas, ke la Esperanto Grupo de Moyá, Barcelona, estas nun nia nova peranto. Ni forte esperas, ke sukcesos al ni ankaŭ en Hispanujo formi ian kernon por TEJO.

Hispanaj geamikoj, vizitontaj P Aquila, anoncu sin aŭ rekte ĉe la OKK, aŭ ĉe la peranto.

Ĉiu ano varbu nur unu novan abonanton. Tio signifos duoblajn enspezojn kaj pli belan revuon.

pagi la presiston ktp. Krom tiun ĉi vi ricevos ĝis la kongreso ankoraŭ 4 nrojn, se ni havos sufiĉe da mono. Komprenu bone, ke neniu el ni havas la rajton rifuzi kunlaboron, aŭ fuŝi la aferojn de TEJO.

Ĉiuj Esperanto- kaj aliaj organizoj plialtigis siajn kotizojn dum la postmilitaj jaroj. La kotizo de TEJO estas tiom malalta, kiom nur eblas. Ĝi estas malpli alta, ol la prezo de 4-5 skatoloj da cigaredo (tion por la fumantoj) aŭ la enirprezo por du filmoj. Vi mem devas kompreni, ke ĉi ĉion ni povas fari - kaj la Estraro

nur tiam povas streĉi siajn fortojn - se vi ĉiuj kunlaboras.

Legu atente nian organon. Sendu kritikon, sendu sugestojn. Sendu artikolojn.

La perantoj sendu siajn listojn kaj sendu monon. Konsideru ĝin via moralala devo tiel pritrakti TEJO-n, kiel vi mem deziras esti traktata.

Atentu la artikolojn pri la kongreso, anoncu vin grandnombre kaj sendu vian kongreskotizon al la OKK, via landa peranto, aŭ la TEJO-kaso. Ne forgesu aldoni certan sumon por la subtana kaso, ĉar ni bezonas ĉiun moneron.

LA IJK EN L'AQUILA

de la 7a ĝis la 13a de aŭgusto 1955.

Adreso de OKK: Sro G. Bronzetti, Via San Martino 8. L'AQUILA (Abruzzi).

Liston de aliĝintoj pro manko de loko ni ne povas hodiaŭ publikigi, ĝis nun anoncis sin \pm 100 personoj. Ĉu ankaŭ via nomo estas sur la listo? Se ankoraŭ ne, anoncu vin tuj.

Ĉu vi jam preparas vin por unu aŭ

alia sport-konkurso? Aŭ ĉu vi preferas partopreni en la literatura konkurso? Atentu la sciigojn en la sekvonta nro de LJV kaj relegu la januaran nron.

Nun legu la ĉi suban artikolon, kiun verkis unu el la OKK-anoj. Bedaŭrinde la senditajn klišojn ni ne povas uzi, sed atentu la majan nron!

L'AQUILA DEGLI ABRUZZI.

L'Aquila, la ĉefurbo de Abruzzi, levigas en la centro de granda valo, nomita „valle aquilana”. Belega kaj sunplena montarkrono ĉirkaŭas ĝin, Gran Sasso (2914 metrojn alta) protekte rigardas al la urbo, la rivero Aterno senĉese babiladas, aŭ flustras siajn misterajn sekretojn.

L'Aquila valo estas unu el la plej belaj de Italujo. Ĝi situas 721 metrojn super la maro. La klimato estas milda, la lokaj belecoj abundaj. Ne malprave oni nomas Abruzzi „Itala Svisujo”. Dum la somermonatoj multaj Italoj rifuĝas la varmon de aliaj provincoj por sin refreŝigi en la malpeza kaj plenklara akvo kaj por enspiri la sanigan aeron de Abruzzi.

La ĉarmon de l'Aquila pligrandigas ĝiaj stratoj, la belegaj palacoj, la mirindaj novromstilaj bazilikoj, la grandioza sporta instalaĵo: moderna, kovrita naĝejo, tenis- kaj basketkampoj, glituma kurejo, granda stadiono kun velodromo ktp.

L'Aquila estas antikva kaj samtempe moderna urbo. La antikvaj dukaj palacoj amike okulumas al la modernaj konstruoj, en kiuj havas siajn oficejojn la regionaj oficejoj.

La moderneco miksiĝas kun la antikveco kun mirinda sintezo kreante atmosferon de agrabla harmonio.

Karakteriza estas por l'Aquila la arkadaroj. Ili estas belaj kaj grandstilaj kaj multajn aquilanojn ili ŝirmas kontraŭ neĝo, pluvo aŭ somera suno. Dum la vesperaj horoj multaj promenadoj tie por renkonti gekonatumojn, por babili iom.

Du ĉefverkoj de novromana arto estas la bazilikoj „Collemaggio” kaj „S. Bernardino”. Collemaggio estas fiero pro sia „sanktpordego” kaj pro la korpo de papo S. Celestino V, kiu kuŝas en ĝi: S. Bernardino entenas la korpon de S. Bernardino el Siena.

Sed la plej fama kaj la plej konata monumento de la urbo estas la „fontana delle 99 canelle”, la fontano el 99 kranoj.

Inter la aliaj monumentoj alte staras la kvincentjara kastelo, en kiu havas sian sidejon la Nacia Muzeo de Abruzzi kaj la Auditorium, ĉi tiu lasta unu el la plej modernaj en Italujo.

Dank'al la „Societa Aquilana dei Concerti” (urba koncerta societo) en tiu ĉi Auditorium la urbo havis kaj havas la honoron aŭskulti la plej famajn muzikistojn kaj orkestrojn de

Eŭropo kaj de la mondo. Kaj pro tio multaj nomas L'Aquilan „Itala Salzburgo”.

Laŭ rakonto de Nicolo Machiavelli l'Aquila fondiĝis en la Teodorica tempo. Post la malapero de la lastaj restaĵoj de la du antikvaj najbaraj urboj „Amiternum” kaj „Forconia” ĝi iom post iom disvolviĝis.

Post la Koncilio de Lione Frederiko la IIa ĉirkaŭigis ĝin per solidaj muroj. Ĉar ĝi kuŝis en la limoj de la reĝlando, ĝi devis kontraŭstari al la avideco de la Papeco dum la senpaca luktado inter Eklezio kaj la Imperio. Tial Frederiko II, ordonis al la estroj de la kasteloj konstrui kvartalojn en la nova urbo kun la sama strukturo, kian havis Jeruzalemo.

Tiel leviĝis rapide 99 kvartaloj, 99 placoj, 99 fontanoj kaj 99 preĝejoj.

Por rememori la feliĉan eventon oni konstruis la faman fontanon kun 99 kranoj kaj kun 99 ŝtonaj maskoj. Ĉiu el ili simbolas la estron, kiu kunlaboris por la konstruado de la urbo.

Eĉ nun ĉiunokte la sonorilo de la urba turo rememorigas al la enloĝantoj la devenon de ilia urbo per 99 sonoradoj.

Frederiko II donis al ĝi eĉ la nomon el la imperia insigno kiel simbolon de sia regado super la ĉirkaŭstarantaj urboj, simile al la reĝado de la aglo super la aliaj birdoj.

Dum la regado de Giovanna la dua la urbon sieĝis Braccio da Montone:

Tiu ĉi estis la sieĝo plej glora por la urbo pro la rezisto de ĝiaj enloĝantoj. Reĝino Giovanna sendis dufoje militajn helpojn ĝis kiam la 2an de junio 1414 la aquilanoj sub gvidado de Antonuccio Camponeschi ekbatalis en la ebenaĵo de Bagno kaj venkis. Braccio da Montone fariĝis kaptito.

Sekve L'Aquila fariĝis arbitra kaj estis taksata la dua urbo de la reĝlando de la Du Sicilioj, post Napoli. Kaj la reĝoj ĝin timis kaj ĝin ŝatis kiel aliancon.

Poste ĝi, regita de saĝaj homoj, vastigis la lan-, silk- kaj safrankomercon tra la tuta mondo. Ĝiaj produktoj estis konataj eĉ en Nederlando, Francujo kaj Germanujo.

En la jaro 1344 la urbo obtenis sian monfabrikejon, kiu presis kun la urba insigno 232 modelojn de moneroj.

Rottwuil, disĉiplo de Guttenberg fondis ĉi tie en 1484 unu el la unuaj presejoj de la tuta mondo. La libro „Esopo” estis la unua libro presata en Italujo.

Poste teruraj pestoj, tertremoj kaj militoj detruis la urbon plurfoje, sed la persisto kaj la amo, ĝin rekonstruigis ĉiam pli bela.

Post kelkaj monatoj L'Aquila bonvenigos vin. Estu konvinkiĝinta, ke la urbo ne seniluziigos vin. De vi dependas, ĉu ankaŭ la kongreso fariĝos sukceso. Giuseppe Dionisio.

daŭrigo de paĝo 32.

Li glitflugis tra la ĉielo kvazaŭ lanco kaj peze falis antaŭ la urbo Mortain. Li releviĝis lama kaj misforma; kaj vidante en la malproksimo la fatalan Monton, kiu staras kiel pinta roko antaŭ la subiranta suno, li bone komprenis ke li ĉiam estos venkata en tiu malfavora luk-

tado kaj li foriris per treniĝantaj kruroj, sin direktante al malproksimaj regionoj, forlasante al la malamiko siajn kampojn, montetojn, valojn kaj paŝtejojn:

Jen kiel Sankta-Mikaelo, patrono de la normandoj, venkis la diablon.

Aliaj popoloj imagus alimaniere tian batalon.

PRI LA INTERNACIAJ KONKURSOJ:

La aliĝontoj nepre indiku siajn intencojn. Ni opiniis jene:

La konkursoj konsistos precipe el:

Teatro: Ĉiu grupo rajtas prezenti teatraĵojn (proks. ludodaŭro 30 min.) dum la Teatraj Vesperoj, kiuj okazos en nia Urba Teatrejo.

Sporto: ni havas je nia dispono la tutan sportkampanon inkluzive de la naĝejo. Oni informu nin ĝustatempe, kiujn sportojn oni scipovas ludi.

Folkloro: estos premiataj la plej belaj kostumoj de la partoprenantoj dum folkloro manifestacio, kiu okazos el la karakteriza pejzaĝo de lago de Scanno.

Poezio: Originalajn poemojn oni sendu al la LOK antaŭ la 1a de julio.

La tri plej belaj poemoj ricevos premion kaj ĉiuj poentojn por la IK.

Skizo por afiŝanonco por nia IJK: Ĉiu esperantisto-TEJO-ano, kiu deziras partopreni ĉi tiun konkurson, devos sendi skizon kies temo estu „Nia 11a IJK” al la LOK antaŭ la 1a de julio. La plej bela skizo estos premiata kaj fariĝos la simbolo de la kunveno. Se la gajninto konkuras nome de iu grupo, li havos ankaŭ specialajn poentojn por la I.K.

Parolado: Dum nia Kultura Vespero ni okazigos ankaŭ paroladkonkursojn pri iu temo, kiun ni poste fiksos. Estos donata premio al la gajninto kaj ĉiu konkuranto ricevos poentojn por la I.K.

LEGENDO PRI LA MONTO SANKTA-MIKAĜLO.

(daŭrigo)..

Post kiam li trinkis tasegon da lakto, Sankta-Mikaelo ekparolis:

- Mi venis por proponi al vi bonan aferon.

La Diablo, naiva kaj bonfida, respondis:

- Plaĉas al mi.

- Jen vi cedu al mi ĉiuj viajn terojn.

Satano, maltrankviliginte, volis paroli:

- Sed

La Sanktulo daŭrigis:

- Unue, aŭskultu. Vi cedu al mi ĉiujn viajn terojn. Mi prizorgos ilian bonstaton, la kamplaborojn, la plugadon, la semadon, la sterkadon, unuvorte ĉion, kaj ni dividos la rikoltojn en du egalajn partojn. Ĉu bone?

La Diablo nature maldiligenta konsentis.

Li petis nur krome kelkajn el tiuj bongustegaj trigloj, kiujn oni kaptas ĉirkaŭ la soleca monto. Sankta-Mikaelo promesis la fiŝojn.

Ili frapis reciproke en siaj manoj, kraĉis flanken por sigeli la faritan aranĝon kaj la sanktulo daŭrigis:

- Vidu, mi ne volas, ke vi trovu kaŭzon por plendi pri mi. Elektu tion, kion vi preferas; ĉu la parton de la rikoltoj, kiuj estos ekster la tero, aŭ tiun, kiu restos en la tero.

Satano ekkriis:

- Mi prenos tiun, kiu estos ekster la tero.

- Interkonsentite, diris la sanktulo.

Kaj li foriris.

Sed jen, ses monatojn poste, en la grandega bieno de la Diablo oni vidis nur karotojn, napojn, bulbojn, skorzonerojn, tiajn plantojn, kies grasaj radikoj estas bonaj kaj ĝuigaj kaj kies senutila foliaro apenaŭ utilas por nutri la bestojn.

Satano ricevis nenion kaj volis rompi la kontrakton, nomante Sanktan-Mikaelon „maliculo”.

Sed la sanktulo havis grandan ŝanton al la kulturado; li refaris viziton al la Diablo:

- Mi certigas al vi, ke mi tute ne pensis pri tio; okazis hazarde; ne estas mia kulpo. Tamen por kompensi vian malprofiton, mi proponas, ke vi ricevu en tiu ĉi jaro ĉion, kio troviĝas en la tero.

- Plaĉas al mi, diris Satano.

En la sekva printempo la tuta surfaco de l'teroj apartenantaj al la Malica Spirito estis kovrata de belegaj grenspecoj, avenoj same grandaj, kiel pintaj turetoj, linoj, bonegaj kolzoj, ruĝaj trifolioj, pizoj, brasikoj, artiŝokoj kaj de ĉio alia, kio elkreskas sub la suno, kun grajnoj aŭ fruktoj.

Satano ankoraŭfoje ricevis nenion kaj tute malkontentiĝis.

Li reprenis siajn herbejojn kaj plugejojn kaj restis surda al ĉiu nova proponklopodo de sia najbaro.

Unu tuta jaro pasis. De l'supro de sia izolita nobelkastelo Sankta-Mikaelo rigardadis la malproksiman kaj fekundan teron kaj vidis la Diablon gvidi la laborojn, enporti la rikoltojn, draŝi sian grenon. Kaj li furiozegis, kolerante pro sia malpotenco. Ne povante plu trompi Satanon li decidis venĝi sin kaj li revizitis lin, petante, ke li venu por tagmanĝi la postan lundon.

- Vi ne havis bonŝancon en viaj aferoj kun mi, li diris, mi scias tion; sed mi ne volas, ke restu venĝemo

inter ni kaj mi kalkulas, ke vi venos por intima tagmanĝo. Mi regalos vin per bongustaĵoj.

Satano, same manĝegema, kiel maldiligenta, tuj konsentis. En la difinita tago li vestis sin per sia plej bela vesto kaj iris al la Monto.

Sankta-Mikaelo lin eksidigis ĉe sia belega tablo. Oni prezentis unue volovanon plenan de kokaj krestoj kaj testikoj kun buletoj de kolbasaĵo kaj du grandajn triglojn kun kremo; post tio meleagron en vino, plenan de konfititaj kaŝtanoj, poste ŝaffemuraĵon de sala herbejo, same bongustan kiel kuko; post tio legomojn, kiuj tuj fandiĝis en la buŝo kaj fine bonan varman platkukon, kiu fumis eligante buteran parfumon.

Oni trinkis puran cidron ŝaŭmantan kaj sukeran kaj vinon ruĝan kaj ebriigan kaj post ĉiu plado oni faris truon¹⁾ per malnova pombrando.

La Diablo trinkis kaj manĝis kiel kofro, tiom kaj tiel ke li eksentis ĝenon.

Tiam Sankta-Mikaelo leviĝinte ekkriis potence kun tondra voĉo:

- Ĉu ... antaŭ mi, antaŭ mi, kanajlo, vi tiel kondutas ... antaŭ mi ...?

Satano terurite ekfuĝis, kaj la sanktulo kaptinte bastonon lin postsekvis.

Ili kuris tra la malaltaj haloj turniĝante ĉirkaŭ la kolonoj, supreniris la subĉielajn ŝtuparojn, galopis laŭlonge de l'kornicoj, saltis de gargojlo al gargojlo. La kompatinda demono korsire malsana forkuris, malpurigante la loĝejon de la sanktulo. Li troviĝis fine sur la lasta teraso, tute supre, de kie oni vidas la tutan grandegan golfon kun ĝiaj paŝtejoj. Li ne plu povis eskapi; tiam la sanktulo donante al lia postaĵo furiozan piedfrapon, elpelis lin kiel pilkon tra la spaco.

daŭriĝo sur paĝo 30

¹⁾ En Normandio „fari truon” t.e. festeno trinki glaseton da brando por doni lokon en la stomako al la manĝaĵo, kiu sekvos.

LA GRANDA MONDO

(infana fantazio).

Al sesjara knabeto mortis patro kaj patrino. Li, restinte sola, ne sciis kion fari, kaj tiam li decidis vojaĝi: li iris al la stacidomo kaj li veturis de Romo (en kiu li estis) al Napolo. La vento, dum lia vojaĝo, movante la foliojn, diris al li: „Malgranda Peĉjo, (ĉar tiel li nomiĝis), malgranda Peĉjo, vi estos la plej saĝa homo en la tuta mondo.”

Alveninte en Napolon, Peĉjo eniris vaporŝipon, kiu veturis al Hindujo tra la Suezkanalo. Dum la marvojaĝo la maro diradis per siaj ondoj: „Malgranda Peĉjo, malgranda Peĉjo, vi estos la plej saĝa homo en la tuta mondo.”

La vaporŝipo alvenis en Suez; ĉi tie Peĉjo alŝipiĝis. Antaŭe li manĝis. Poste li vizitis la urbon: li vidis ĉie komercistojn, grandajn aŭ malgrandajn, kiuj parolis ĉiujn lingvojn, kaj ĵonglistojn, precipe malgrandajn.

Poste li iris al Kajro. Tie li dormis la duan nokton. Vekiĝinte li iris al la Piramidoj de Gizeh. Kaj ĉi tie okazis tre granda strangajo: Peĉjo vidis la Faraonojn de Egiptujo. Ili parolis pri la antikva Egiptujo; pri la Piramidoj, kiuj estis iliaj tomboj, el kiuj ili eliris por spiri; pri la grandegaj temploj; pri la dioj de sia tempo; pri la kutimoj de sia tempo. Ili diris: „Ni estis la Faraonoj de Egiptujo, kiu estis la plej civilizita (modestecon apartigante) nacio en la tuta Antikva Mondo. Ni vivis tre bone. Ni konstruigis la Piramidojn, kiuj estis niaj tomboj, en kiujn, post la morto, ni estis metataj, mumiigitaj, por resti eterne vivantaj. Ni estis la filoj de la Dioj, kaj kiel tiaj adorataj; en dua rango estis la Pastroj; poste la popolo kaj fine la sklavoj.

Sed nun ni devas foriri; revenu morgaŭ. Adiaŭ!”

Peĉjo restis ŝtoniĝinta.

La postan tagon Peĉjo pensis: „Nun mi konas la Faraonojn. Mi estas vere kontenta: ili povas min helpi.” Iom poste Peĉjo revenis al la Faraonoj. Ĉi tiuj ne estis solaj: ili estis kun la iama egipta loĝantaro; sed, vere, el la Faraonoj estis nur Keopo. Peĉjo ekkriis: „Kion vi faras?!” Keopo respondis: „Ni volas fondi la Societon de la Saĝuloj. Ankaŭ vi devas aparteni al ĝi.” Peĉjo restis ree ŝtoniĝinta.

„Nu, vi volas fondi la Societon de la Saĝuloj, kaj mi devas aparteni al ĝi. Tiam kion mi devas fari?” diris Peĉjo. „Vojaĝu, kaj vi lernos”, respondis Keopo „Trapasu la landon de la Pigmeoj, kaj helpu ilin ĉasante elefantojn. Ili donacos al vi elefantan felon kaj junan elefanton. Per la felo vi konstruos boateton kaj la elefanto remos per sia nazego. Vi parolos kun la elefanto kaj vi scios kiel vivas la elefantoj. Vi vojaĝos ĝis Ameriko; vi manĝos birdojn, kiujn vi ĉasos per la sagoj, kiujn donos al vi la Pigmeoj. Vi veturos ĝis Novjorko, kaj tion, kio tie okazos diros al vi la Pigmeoj.” „Multajn dankojn. Morgaŭ mi vojaĝos.”

Peĉjo atingis la Pigmeojn Kiam ĉi tiuj lin vidis, ili lin salutis kaj diris: „Ni bonvenigas vin en nia Societo de la Saĝuloj, ĉar vi estos la plej saĝa homo en la tuta mondo.” Peĉjo demandis: „Ĉu ĝi estas tiu de la Faraonoj?” „Jes, ĝuste tiu.”

La postan tagon Peĉjo iris ĉasi elefantojn. Li mortigis dudekseson da ili, kaj tial li ricevis elefantan felon kaj junan elefanton, kaj ankaŭ sa-

gojn kaj sagjetilon. La Pigmeetoj nun ĉasludis: dudek estis la elefantoj kaj tridek la ĉasistoj. Peĉjo, vidante ilin, kore ridis.

Pigmeo la Malgranda, Reĝo de la Pigmeoj, diris: „Peĉjo, nun iru al Ameriko per la elefanta felo, remante per la juna elefanto Ho, ne, ne per la nazego de la juna elefanto Vi alvenos al Novjorko; tie vi loĝos ĉe Sinjoro John Rady, kiu estos via instruisto. Lia birdeto diros al vi kion vi devos fari.”

Peĉjo, vojaĝante, interparolis kun la elefanto: „Kiel vivas la elefantoj?” „Bone, sed ni estas ĉasataj. Ni manĝas herbon. Ni iras morti en nia mortejo.”

En Novjorko, Peĉjo iris al Sinjoro John

Kiam li frapis ĉe la pordo, venis malfermi la profesoro, kiu tuj demandis: „Ĉu vi volas veni en mian kolezion? Mi fondis ĝin ĝuste hodiaŭ matene. Vi estas la deka lernanto kiu sin prezentas, kaj ankaŭ vi por la unua klaso. Ĝuste nun finiĝis la tempo por sin prezenti. Nun oni devas iri dormi. Ĉiuj iru dormi en la unua dormoĉambrego, en kiu estas multaj litoj. Ĉiu elektu la sian kaj sur ĝi skribu sian nomon por ne konfuzi ĝin kun tiuj de la aliaj!”

Poste li prenis sian kajeron kaj skribis, dum ĉiuj sonĝis: „Sin prezentis: Johano Rido, Roĝero Sumoj, Alberto Homoj, Jakobo Kuro, Abramo Kuro, Ahilo Morto, Johanino Beleco, Rahelo Beleco, Mario Vivo kaj Peĉjo Admonoj.”

Peĉjo dormis kaj sonĝis: sed kion?

Li flugis per la sonĝo ĝis Romo, sed, dum li promenadis tra la urbo, la vento lin prenis dolĉe kaj lin transportis ĝis rozkolora nubeto, kiu lin prenis kaj flugis kun li, kaj lin apogis ree sur lian liteton. La tago estis lundo, la 4-a de januaro de la jaro 2000-a. Estis la oka kaj sep minutoj,

kiam la sonorileto vekis ĉiujn. Ili tuj ellitiĝis kaj kuris lavi sin en la banejo, kaj poste ili reiris en la dormoĉambron por sin vesti per la kolegiaj vestoj. Je la naŭa ili ĉiuj estis pretaj. Tiam la profesoro enirigis ilin en ĉambron, kiu estis klaso. Tiam li diris: „Nun vi lernu, kiel vi devas skribi. Ni komencu de la bastonetoj. Jen kiel oni faras bastoneton. Nun mi donas al ĉiu kajeron Sur ĝi ĉiu faru paĝon da bastonetoj.”

La Profesoro daŭrigis: „Mi volas ankaŭ vidi, kiu finos la unua. Al tiu mi donos ĉokoladeton. Al la aliaj mi donos aliajn premiojn.” Tiam ĉiu komencis skribi tre rapide. Kiam ĉiuj finis, la Profesoro diris: „Kiu je la fino de la jaro estos ricevinta pli multajn gramojn da ĉokolado, tiu estos la unua en ĝenerala klasifiko. Nun ĉiu pretigu paroladeton, kiun li poste diros Esperante. Antaŭe vi ekzerciĝis iom en la skribado, sed mi volas, ke vi ankaŭ parolu bone. Se vi ne scias kion rakonti, vi povas elpensi historieton, fableton, rakonton, ĉu ne?”

Sed dum tiu tempo la Profesoro prenis la gazeton kaj legis: „Afrika elefanto promenas tra la urbo.” Ankaŭ Peĉjo ĉi tion legis, li rememoris, li kuris al malgranda kaĝo, en kiu li estis vidinta birdeton. Li aŭskultis kion diris la estajeto kaj komprenis. La birdo donis al li ŝlosileton, per kiu li malfermis pordeton en la muro, kaj la tuta saĝeco de la mondo estis en li. Tiam li forkuris, lasante sciigan leteron al la Profesoro. Kaj li, kun la elefanto kaj per la elefanta felo, denove transiris la oceanon.

Peĉjo revenis al la Faraonoj, kaj Keopo diris: „Vi nun estas la plej saĝa homo en la tuta mondo.”

Niĉjo Minnaja
naskiĝinta la 9-an de
januaro 1938-a
en Romo.